

Heinrich Heine,

## En Majo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj  
 Burĝonoj malfermiĝis,  
 La amo kiel floro  
 En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj  
 Birdetoj sin aŭdigis,  
 Al ŝi deziron mian  
 Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,

## En dolĉega Maj'

*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj',  
 Dum la burĝonoj krevis,  
 El mia koro ĝerme  
 Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj',  
 Dum birda kanto sonis,  
 De l' kora mi sopiro  
 Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*